

LITERATURO

1. C. Janet, Chem. News, **138**, 372, 382 (1929.)
2. Yeou-Ta, Annales de physiques, **1**, No 1, 88 (1946)
3. L. M. Simmons, J. Chem. Educ., **24**, 583 (1947).
4. В. М. Клечковский, Доклады Академии Наук СССР, **80**, 603, (1951).
5. В. М. Клечковский, Журнал экспериментальной и теоретической физики, **23**, 115, (1952).
6. R. Nakala, J. Phys. Chem., **56**, 179 (1952).
7. В. М. Клечковский, Журн. физ. хим., **27**, 1251, (1953).
8. В. М. Клечковский, Доклады Академии Наук СССР, **92**, 923, (1953).
9. В. М. Клечковский, Известия Тимирязевской сельско-хозяйственной академии, 1953, № 1, (2), 159.
10. В. М. Клечковский, Доклады Академии Наук СССР, **95**, 1173, (1954).
11. В. М. Клечковский, Журнал экспериментальной и теоретической физики, **26**, 760, (1954).
12. В. М. Клечковский, Известия Тимирязевской сельско-хозяйственной академии, 1954, № 2, 205.
13. В. М. Клечковский, Журнал экспериментальной и теоретической физики, **30**, 199, (1956).
14. В. М. Клечковский, Оптика и спектроскопия, **2**, 3, (1957).
15. В. М. Клечковский, Известия Тимирязевской сельскохозяйственной академии, 1957, № 1 (14), 200.
16. Д. А. Бочвар, Журнал физической химии, **26**, 1095, (1952).
17. F. Tüdos, Naturwissenschaften, **41**, 138 (1954).
18. M. V. Tomkeieff, Nature, **167**, 954 (1951).
19. А. Ф. Капустинский, Доклады Академии Наук СССР, **80**, 365, (1951).
20. Е. И. Ахумов, Журнал общей химии, **17**, 1241, (1947).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Sciencia Asocio
Esperantista, Vol. 16. n-ro 3/4 (1965)

413.2 (038) (= 408.92)

**SUPLEMENTA INDEKSO
DE LA SCIENCAJ, TEKNIKAJ KAJ CETERAJ FAKVORTAROJ EN
ESPERANTO**

depost 1961. ĝis 1966. aperintaj
ISAE-TC-122

En Sciencia Revuo **12**, n-ro 47-48, p. 118-128 aperis indekso de la fakvortaroj ĝis 1961. aperintaj. La ĉi suba listo enhavas tiujn vortarojn kiuj depost tiam ĝis la komenco de 1966. aperis, kaj ankaŭ tiujn kiuj ĝis nun erare ne estis menciitaj.

La listo estas ordigita laŭ fakoj laŭ UDK, kaj dekstre apud ĉiu vortara indiko estas indikitaj la respektivaj traduklingvoj. Laŭ interkonsento de la direktoroj de la **Akademias Sekcioj pri la Vortrezoro kaj Teknikaj Vortaroj** ni uzas de nun denove la pure esperantajn simbolojn por lingvoj (vd. S. R. **14**. n-ro 53-54, p. 4-12):

A angla	G germana	Ng norvega
Bl bulgara	Gr greka	Pl pola
Ĉ(/C)ĉina	H hispana	P portugala
Ĉh(/Ch) ĉeĥa	Hg hungara	Rn rumana
Dn dana	I itala	D rusa
E/Eo esperanta	J japana	Sb-Kr serto-kroata
Fa finna	L latina	Sv sveda
F franca	Nl dederlanda	Tk turka

Ni volas atentigi la legantojn, ke la aĉeteblaj fakvortaroj estas indikitaj en la Jarilbroj de UEA.

038	Dictionnaire Francais - Esperanto (Léger & Albault); 672 & 56p.; Marmande 1961.	F-Eo
038	Esperanto-Bulgara Vortaro (Sarafov k. a.; 441p., Nauka i Izkustvo. Sofio 1963.	E-oBl
2	Budhisma Terminaro (Sadler); 14p.; Kandy 1962.	Eo
2	Pri dezirinda psikisma terminaro (Chaigneau) 10p.; en »Raporto pri la subkongreso de Esperanta-Psikistaro«; Antverpeno 1911.	Eo
2	Katolika Terminaro (Wannemakers kaj Huberteno); 53p., Tilburg 1963.	Eo-L

- 2 Katolika Terminaro (Flammer); 44p., IKUE G-Eo
1963.
- 2 Katolika Terminaro (J. M. Claramunt Sch. P.) Eo-H
369.43 Skolta kaj tenduma terminaro (Hammer). 28p.;
Eld. Skolta Esp.-Ligo 1963. Eo
- 51 Plurlingva Matematika terminaro, projekto Eo-G-A
surbaze de kunlaborado en la verkado de la (-F-H-I)
teknika-sciencia parto de PIV (O. Reiersøl).
307 t. en la lingvoj angla kaj germana, la plej
multaj el ili tradukitaj en la francan, kaj
multaj el ili en la hispanan kaj italan. Stencile
multobl., 22p., 21 × 29,7 cm, 307 t., Oslo
(Norveg.), 1963; havebla ĉe Prof. Olav Reiersøl,
Institutt for matematiske fag, Universitetet,
Blindern, Oslo, Norvegujo.
- 531/534 Mekanikaj Terminoj, precipe pri mekanismo — J-A-Eo
: 62 Kurso Fundamenta K. (Ossaka kaj S. Takata),
Ekstrapresaĵo 14p., 15 × 21 cm, ĉ.650 t.; Tokio
1962; havebla ĉe Prof. K. Ossaka, Senzoku
1447, Maguroku, Tokio Japanujo.
- 551.5 Meteologia Terminaro (M. Lewin); alfab. en Eo
Eo kun dif. en Eo, pluraj specialaj tabeloj.
59p., 11 × 15 cm, c.1470 t., ĉ.1470 dif.; UEA-
-jarlibro 1961, dua parto; havebla ĉe UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Ned.
- 61 Vortoj uzataj en medicino (Kato), Nagano, Eo
1962.
- 611.84 Terminaro oftalmologia (Kato); 8p., en »Ler- Eo
nolibro de oftalmologio«, 2-a eld., Nagano 1963.
- 614.84 Brulŝirmvortaro = Fajrobriĝada teknika ter- A-G-F-Eo
minaro. International Technical Vocabulary by NI-Ng-Sv
International Committee for the Prevention I-H-R-Pl
and Extinction of Fire — CTIF — Wien 1963. Ĉh-Tk
13-lingva; la esp-aj t. estas donitaj de la
Aŭstra Esp.-Instituto. 21 × 29,7 cm; 163p.,
ĉ.500 t., ĉ.500 dif. en A,G kaj F.
- 621.3 Esperantlingva vortlisto aneksa al Grupo 05 —
Difinoj de fundamentaj nocioj — de Interna- Eo
tional Electrotechnical Vocabulary, 2-a eld. (IEC-in-
Genève 1954. Kiel ISAE-Rekomendo (Ha- dico)
ferkon/Utne) eld. Oslo 1962. Partoj: IEC-indi-
co/Esperanta kaj Esperanta/IEC-indico; stencile
multobl.; 20p., 21 x 29,7 cm; 610 t.; havebla
ĉe TC de ISAE. Prezo: 4 steloj aŭ 3 rpk.

- 621.3 Pola-Esp. kaj Esp.-Pola Fundamenta Termina- Pl-Eo
ro de Elektrotekniko (aneksa al Grupo 05 de Eo-Pl
International Electrotechnical Vocabulary, dua
eld.); eld. de Pola Esp. — Asocio (Siwicki), Var-
sovio 1963; 14,8 x 21 cm; 54p.; 610t. Stencilita
kun presita kovrilo, broŝurita.
- 621.3 Esperantlingva vortlisto aneksa al Grupo 10 — Eo
Elektraj maŝinoj kaj transformiloj — de Inter-
national Electrotechnical Vocabulary, dua eld.,
Geneve 1954. Kiel Projekto de ISAE Rekomen-
do (Haferkorn) eld. 1962: IEC-indico/Esperanta.
Hektografie multobl.; 8p.; 21 x 29,7 cm; 389t.;
havebla ĉe TC de ISAE kontraŭ 4 steloj aŭ
3 rpk.
- 621.3 Esp. —Pola terminaro de Elektraj Maŝinoj kaj Eo-Pl
Transformiloj, aneksa al Grupo 10 de la 2-a Pl-Eo
eld. de Int. Electrot. Vocabulary; eld. de Pola
Esp. —Asocio (K. Siwicki), Varsovio 1963; 41p.,
389 t.
- 621.3 Pola-Esp. terminaro, aneksa al Grupoj 07 = I Pl-Eo
Elektroniko, kaj 08 = Elektroakustiko de Inter- II Eo-Pl-
nat. Electrot. Vocabulary; eld. de Pola Esp. -A-F-G-
—Asocio (K. Siwicki), Varsovio 1965. 171p.; -I-Sv
1,46 x 20,5 cm; 937t.; stencilita kun presita ko-
vrilo, broŝurita.
- 621.793 Terminaro pri la kovrado de metaloj kaj gal- Eo-A
vanizado (J. McCarthy). 10p., 21 x 29,7 cm; sten- A-Eo
cile multobl.; Monroeville 1964; ĉ.240t.; havebla
ĉe s-ro J. A. McCarthy, 4421 Driftman Dr.,
Monroeville, Pennsylvania, USA
- 625.1/.6 Fervojaj Terminoj — Railway technical terms- A-Eo
— (E. M. Rosher); eld. 1958, hektogr. multobl.;
57p., 20 x 25 cm; ĉ.2730t.; baziĝanta sur traduko
farita pri la franca angla eld. de Lexique tec-
hnique ferroviaire publikigita de Société Nati-
onale de Chemins de Fer (S. N. C. F.); havebla
ĉe s-ro E. M. Rosher, Tamalpais, Kingsley Gre-
en, Haslemere, Surrey, Anglujo. Prezo: 8/0 d,
Post free = 16 steloj.
- 625.1/.6 Fervoja Terminareto — Kleines Eisenbahn- G-Eo
Wörterbuch. Eld. Germana Esperanta Fervoji- Eo-G
sta Asocio, 1966. (G. Ritterspach); antaŭvideble
64-68p.; 11,4 x 16,2 cm; ĉ. 2000t. Havebla ĉe
Elisabeth Ritterspach, D-607 Langen, Berliner

- Allee 1, Germanujo aŭ pere de Germana Esp-a Fervoj., Asocio, D-6 Frankfurt/M, Karlstr. 4-6. Prezo: antaŭvideble 6,00 DM plus 10% afranko.
- 629.113 Vortarelo por Aŭtomobilistoj (M. Jaumotte); Ec-A-F-G
: 656.13 eld. de Internacia Esp. — Klubo Aŭtomobilista I-NI
(IEKA) aperanta ekde Januaro 1965. laŭ daŭrigoj en »Aŭto-Revuo«; ĉ. 600t., alfabetaj laŭ la Eo-terminoj, kun traduko en 5 nacilingvojn.
- 656.835 Vocabulaire Français-Eps., contenant les mots F-Eo
speciaux á la philatelie (Lemaire); 21p.; eld. Groupe espérantiste de Paris, 1903.
- 656.835 Philatelistische Fachausdrücke, zusammenge- G-Eo
stellt von H. Koch, München, ĉ. 500t.; aperis en Germana Esp. — Revuo 1960. (Marto ĝis Novembro)
- 656.835 Cizojazyčná korespondenco pro filatelisty (Kuch- Eo-Ĉh-R-G
arsky). 225p.; eldonejo de transporto kaj komu- F-A-L-H-Hg
nikiloj, Praha 1962.
- 674 Lignaj juntoj ilustritaj, sugestataj nomoj (E. Eo
M. Rosher). 20p., 21 x 26 cm; kun krestomatio kaj multnombraj ilustraĵoj; hektogr. multobl., Haslemere 1959; havebla ĉe E. M. Rosher (adreso vd. supre!), kontraŭ 6 steloj aŭ 3 rpk.
- 674 Ĉarpentiloj, sugestata Esperanta nomenklatur- Eo
(E. M. Rosher). 10p.; 21 x 26 cm; kun krestomatio kaj pluraj ilustraĵoj; hektogr. multobl. 1959; havebla ĉe E. M. Rosher (adreso vd. supre!) kontraŭ 3 steloj aŭ 3 rpk.
- 685.31 The shoemanis foreign terms (Wright). 103p.; A-F-G-H-I
3-a eld. Leicester 1962. Sv-NI-Eo
R-H.

**SCIIGOJ DE LA TERMINOLOGIA CENTRO
(ISAE — TC—121)**

ESPERANTO EN SESLINGVA KOMPENDIO DE GEOLOGIO

En la eldonejo »Société d'édiction d'enseignement supérieur«, 5, place de la Sorbonne, Paris 5e, dum 1965. aperis grava verko de **A. Cailleux, E. Ehrlich, R. Gérard, A. Gorodiski, J. — P. Michel kaj M. Moreno:**

ELEMENTS DE GEOLOGIE EN SIX LANGUES,

nome en la germana, hispana, esperanta, rusa, franca kaj angla. Ĉiu el la aŭtoroj verkis en nacia lingvo, escepte de s-ro **Robert Gérard**, Professeur Honoraire de l'Université de Paris, kiu verkis la esperantlingvan parton, entuziasme respondinte al la peto de mondkonata Profesoro **Cailleux** (Sorbonne, Paris), poligloto kaj granda amiko de nia Internacia Lingvo.

La bele aspektanta libro broŝurita, 191-paĝa de la formato 16 x 24 cm, estas precipe rimarkinda pro sia oportuna aranĝo de la ses lingvoj, nome tiamaniere, ke ebligas al la uzanto, kompari pecon de la teksto en ĉiuj el la menciitaj ses lingvoj, sen turni la folion. Do ĉu maldekstra paĝo enhavas proksimume 16 liniojn de la teksto en la germana, hispana kaj esperanta, kaj ĉiu dekstra paĝo la respektivan tekston en la rusa, franca kaj angla lingvoj. Tio plifaciligas kompari la saman tekston en la diversaj lingvoj kaj la terminojn en ili uzitajn.

La enhavo de la verko estas bonkvalita kaj interesege; ĝi reprezentas eminentan kompendion en ĉiuj el siaj subsekcioj, nome **Ĝenerala Geologio, Geofiziko, Mineraloj, Petroj, Paleontologio, Geologiaj fenomenoj eksterdevenaj, Geologiaj fenomenoj interdevenaj, Stratigrafio kaj Deveno kaj elvolviĝo de Homo.**

La verko estas zorge reviziita kaj enhavas nur malmultajn preserarojn, malgraŭ ke la tipografistoj ne estis esperantistoj. Ekz-e sur p. 126, ant. 34, devas teksti »sinkkavaĵoj« anstataŭ »sinkavaĵoj«. Prof. **Gérard** prave enprenis en la vorttrezoron kelkajn novajn fakvortojn, nome

glaĉer/o (speciala glaci/ejo);
inlandsis/o (glacia kontinenta tegaĵo, kontinenta glaĉero);
isberg/o (flotanta glacimonto);
lem/o (argil/umo, ŝlim-tero);
strati/o (sedimenta tavolo, pp la geologia historio);
varv/oj (specialaj argil-tavoloj)

kaj aprobis leŭs/o' (aŭ 'lĉes/o') kiel la nomon de speciala flava kalkpetra ŝlimo.

Ni gratulas **Prof. Gérard** pro tiu bonega verkaĵo, kiu reprezentas ne nur eminentan pliriĉigon de la esperanta fakliteraturo, sed ankaŭ imitindan modelon por kromaj fakaj kompendioj verkotaj inkluzive de la Internacia Lingvo. En la 'Enkonduko' la aŭtoroj atentigis, »ke legi kvin fremdajn lingvojn ne estas atingeble por ĉiuj. Se ĉiuj laborraportoj estus tradukitaj en unu internacian lingvon, la fakuloj tutmondaj bezonus lerni nur unu lingvon.«

R. Haferkorn